Ideoj, proponoj, projektoj por Raport-Reelekta Konferenco de REU (4/5.08.17, Poŝehonjo)

La proponoj estu senditaj al konferenco@reu.ru

Bonvolu eldiri viajn opiniojn pri la listigitaj proponoj, subtene aŭ kritike, en diskutlisto reu-agado ĉe yahoogroups.com. Por aliĝi al la diskutlisto, sendu mesaĝon al reu-agado-subscribe@yahoogroups.com

1. **Jaroslav Kikavec (Tverj)**. La projekto de internacia reto de tradukado de videoj per Esperanto https://www.dropbox.com/s/f9uvupwemp15vca/proekto.odt?dl=0
2. **Thierry Saladin (Montpeliero).** La propono estas sendita al la komisiono pri eksteraj rilatoj. Ĝi povus esti interesa ankaŭ al aliaj konferencanoj. https://drive.google.com/file/d/0B0Avmol6Kce1Y1lmN1RvZERhbnM/view?usp=sharing
3. **Vladimir Levadnij (Sankt-Peterburgo).** En kadroj de nova sociutila projekto “Teĥnokom” estas kreita agadgrupo kun temo “Internacia lingva integriĝo”, kies celoj estas reciproka penetrado de naciaj lingvoj inter landoj kaj disvastigo de komuna helplingvo Esperanto. Mem la projekto planas uzi Esperanton kiel laborlingvon. Jam nun komenciĝis esperantigo de la paĝoj. REU kaj rusiaj esperantistoj estas invitataj al la kunlaboro https://www.facebook.com/VladimirLevadnijOficiala/
4. **Katerina Arbekova (Novosibirsko)** proponas sin kiel kandidato por la posteno de prezidanto de REU http://reu.ru/spaco/adresaro/inf/19
5. **Valentin Seguru (Mitiŝĉi, Moskva provinco):**
    1) Maksimuma eluzo de la memordato 100 jaroj depost forpaso de L.L.ZAMENHOF en la kalendaro de UNESKO por 2017.
    Vidu ĉe: unesco.org.
    Precipe temas pri tio, ke en urboj, kie esperantistoj havas iujn bonajn kontaktojn kun la lokaj urbestraroj ni proponu nomigon de stratoj, placoj, skvaroj, metrostacioj je la nomo de L.L. ZAMENHOF aŭ Esperanto.
    Certe tio estas reala nur por ne jam nomitaj lokoj, inter kiuj plej ofte troveblas sennomaj skvaroj.
    Tian laboron ni nun faras en MOSKVO, por kio estas skriba subteno de UNESKO-Komisiono de Rusia Federacio, kies gvidanto estas nia ekstera ministro S.V. LAVROV.
    Certe, MOSKVO havas grandan avantaĝon, ke LLZ loĝis ĉi tie dum du jaroj, kiam komencis studi en Medicina fakultato de Moskva imperiestra universitato. Konserviĝis la domoj, kie li studis kaj loĝis. Sed la Kalendaro de UNESKO kun memor-datoj estas por ĉiuj, ne nur por MOSKVO!

    2) En lastaj jaroj en rusiaj mezlernejoj oni enkondukas la duan fremdan lingvon. Tiu afero estas ne unumomenta, des pli bone por ni.
    Tio donas ŝancon por Esperanto.
    Tamen, oni sciu, ke en mezlernejoj rajtas instrui nur lernejaj instruistoj de fremdaj lingvoj:
    sekve ni allogu al Esperanto lernejaj instruistoj aŭ nunaj, aŭ estontaj - studentoj de tiu direkto.
    Tiu afero havas ankaŭ alian flankon: instruistoj bezonas lernolibron aprobitan en Eduka ministerio speciale por mezlernejoj. Kiel tia lernolibro oni povus preni tiun de Tatjana Georgievna LOSKUTOVA el IVANOVO, konata Esperanto-instruisto.

3) Ĉe la paĝaro de REU reu.ru estus bone aldoni literaturan paĝon, kiu enhavu tradukojn de la rusa al Esperanto de rus-lingvaj tekstoj: prozo, poezio, kantoj. Se ili jam estas ie publikigitaj - povas esti nur la koncerna ligo al alia paĝaro.

6. **Viktoro Aroloviĉ (Moskvo)**. Mia sola proponeto koncernas la sferon de dokumentado. Mi rimarkis, ke lastatempe en diversaj tekstoj al la nomo de la Konferenco insiste aldoniĝas kroma difino "raport-(re)elekta". Mi tiun aldonaĵon ne subtenas, opiniante ĝin papaga transpreno el la praktiko de aliaj, neesperantistaj organizaĵoj. Precipe maltaŭgas, se la aldonaĵon oni majuskligas: "Raport-Reelekta", per tio misprezentante ĝin kvazaŭ legitiman parton de la oficiala nomo. Mi proponas plue uzi la nomon "Konferenco de REU" sen la bizara pliaĵo - tiel, kiel ĝin difinas la Statuto kaj la Ĝenerala Regularo.

7. **Nina Omelĉenko (Novoĉerkassk).** 25-28an de aŭgusto ni invitas gesamideanojn al DELoj – Donaj Esperantaj Ludoj. La aranĝo okazos en la ekzotika loko de Rostova regiono - Etna-argeologia turista naturparko “La Kaŝita Mondo” («Затерянный Мир» - http://zatermir.ru/). Dum la semajnfino la partoprenontojn atendos ne nur bunta Esperanta luda programo, kaj ankaŭ vojaĝo en paseon. Sur “La Pado de Historio” ni vizitos la setlejojn de ŝtonepoko kaj bronzepoko, la kabanojn, sanktejojn kaj metiejojn de prahomoj. Eblas eĉ akiri spertojn kaj scipovojn de antikvaj ĉasistoj, fiŝkaptistoj, nomadoj, en la antikva tumulo konatigxi kun ritaj kaj kredaj sakramentoj de niaj prauloj.